La Esperanto-Gironde Informilo

DECEMBRO 2025

N° 181

Agrablajn jarfinajn festojn!

ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC
la 28an de septembro 2025
de la 10a 30 ĝis la 16a

Ĉ**eestas**: Ĵanseb kaj Annie Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Katya Gradzion, Joël Lajus, Olivier Moreno, Seán Ó Riain, Klodin' Pomirol, Marcelo Redoulez, Jean-François Seylier, Eric Tiffon.

Senkulpigitaj: Lucienne Laroche, Bernardo, Maeva kaj Rose-Sarlandie,

Elvezio bonvenigas al ĉiuj kaj dankas pro LEGI 180.

1. Forumo de la asocioj la 6an de septembro en Pesako
Aperis raporteto en LEGI 180.

2. Nuligita koncerto
Tiu koncerto povos okazi je iu ajn dato, kiam estos libera salono, ekzemple en salono France.

3. En la universitato
- La lingva Festo okazos ĵaŭdon la 2an de oktobro dum la tagmanĝa paŭzo. Ni disponos pri budo.
- La Esperanto-kursoj komenciĝis: ĉeestas Jean-François, Harvé, Anthony, Lucie, Michelle (distance per Zoom).

4. Pri GEME-materialo
Marcelo kaj Klodin' kunportis la materialon, tre valoran. Ĉiu povas preni tion, kio lin /ŝin interesas, por disdoni aŭ por si mem.
Marcelo klarigas la originon de GEME (Groupe Entre-Deux Mers d'Espéranto): Antaŭ kelkaj jaroj kreiĝis grupeto en Créon far Morine Stride. La grupo estis sufiĉe aktiva, Morine instruis en la lernejoj. Ŝi kreis antenon de Esperanto-Gironde en Créon, sed ŝi translokiĝis al Bretonio.

La restantaj membroj deziris daŭrigi la agadon kaj familo transprenis el Saint-Genès de Lombaud la rolon. Ili fondis asocion por senpage disponi pri urba salono. Sed pluraj membroj, pro diversaj kialoj, ne plu povis partopreni kaj la asocio ne plu povis elteni la diversajn kostojn (asekurajn, bankajn). Do estis decidite nuligi la asocion.

Ili dum jaroj akumulis multan valoran pedagogian materialon (ludoj, libroj, propagandiloj ktp.), kiun ili transdonis al Esperanto-Gironde. Estas granda stoko. Kie ĝin konservi ?
Eble oni povus peti de la urbo Pessac havi ŝranketon aŭ ŝranko-parton en la salono Le Bourg.
La ĝiro de GEME al la bankokonto de Esperanto-Gironde estis farita.

5. Traduko de la blidstrio
Marcelo: Ni baldaŭ finos la tradukon. Domoniko estas preta printi kelkajn ekzemplerojn por disdoni en festo aŭ foiro.

6/ Aliaj aferoj
- La Grajneto: **Eric** ne partoprenis en la rekonto de septembro.

- **Seán** prezentis Esperanton je budo en Parentis en la foiro de la asocioj. Bedaŭrinde li ne notis la nomon kaj adreson de la interesatoj.

- **Jean-Seb** La prezidantino de la Domo de la asocioj en Pessac loĝas en la iama dom de Camille Julian. Partoprenis en teatra aranĝo en tiu domo okaze de la Tagoj de la Heredaĵo, ludante la rolon de Bergonié.

- <u>Pri Brassens</u>
Yannick: Ĝis nun vendiĝis 25 ekzempleroj.
Marcelo vizitis la Brassens-Muzeon en Sète kaj prezentis la libron, kiu multe plaĉis. Ni renkontis la responsulinon de la muzeo, kiu ege ŝatis la libron. La responsulino de la vendejo petis, ke oni sendu nataŭtaskon por 15 ekzempleroj. **Marcelo** petis ĉu eblus prezenti prelegon en la muzeo, pro tio, ke la unua traduko de kanzono de Brassens estis verŝajne en Esperanto (*La chasse aux papillons*, far Roger Bernard), kiu kantis ĝin en Esperanto en kabaredo La Tri Koboldoj. Li sendu la preleg-proponon al la muzeo por, ke ĝi estus enprogramigita por 2026.

Yannick sendis la antaŭtakson, laŭ la kutima rabato (30%). Eĉ kun tiu rabato, ni ne perdos monon. La muzeo pagos la sendokostojn.
Elvezio: Hervé sendis tri en Greziljono kaj donacis unu al la kastelo mem.
Yannick: Do vendiĝis ĝis nun 28 ekzempleroj.
Elvezio: En la universitato, nenio nova pri la aĉeto.

- **Marcelo** estis en Arrout en Arieĝo por prezenti sian floraron. Renkontis gebotanikistojn, kiuj proponis kunlabori por eldoni libron prie. Tiuj kreis asocion por helpi al instruo de Esperanto en Afriko, kaj kolektas monon. Ili somere gastigas diversajn grupojn. Ili estas tre bonkoraj homoj. La loko estas ja vizitinda. Ili povas gastigi staĝojn, ekzemple de Espéranto-Gironde.

- **Elvezio** gratulas al Seán, kiu estis elektita vic-prezidanto de UEA.
Seán: Tri membroj de la estraro de UEA loĝas en Francio. La du aliaj estas François Lo Jacomo, kaj Aleks Kadar. Aperos en Esperanto-revuo intervjuoj de la 9 estaranoj, unu post la alia.
Marcelo: Kiel Esperanto-Gironde povus helpi en viaj taskoj?
Elvezio petas de Seán prezenti la programon MLA (MultLingva Akcelilo) en la venonta kunveno de la 26a de oktobro.

La kunveno finiĝas je la 125a 35.

Post la manĝo, **Marcelo** proponas diskuti pri la evoluo de Esperanto per du ekzemploj:
1/ Kiel traduki «partriarcat» en la esprimo «lutter contre le patriarcat». La difinoj de PIV el la derivaĵoj de «patriarko» klare ne taŭgas. Ĉu necesas modernigi PIVon ? Pluraj komentas kaj faras proponojn (ĉu «patriarkismo»?)
2/ Ĉu «multnombri povas signifi «esti multnombra» ? La radiko estas nombri, kiu estas transitiva verbo. Sed en PIV ekzistas la adjektivo «multnombra »; do el ĝi, oni povas estigi verbon, kiu signifas «esti multnombra ». Por tiu verbo ekzistas multaj aperaĵoj en la Esperanta Tekstaro, kiuj estas el la 21a jarcento.

Marcelo informas, ke la kanzono *La sul-insulo*, kantita de Kajto en Brno, okaze de la malferma kunsido de la UK, ricevis la 1an premion en la konkurso pri originala kanzono Ĝanfranko 2025 de la Itala Esperanto Federacio. Ĝi estis verkita de Marcelo kaj muzikigita de Kajto. Li montras bildaron pri Rouzic, la «sul-insulo» (vd LEGI 173, p. 20), kaj, aŭskultinte la kanzonon far Kajto, ni ĝin kunkantas.

Raportis Janine

ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC
la 26an de oktobro 2025
de la 10a 30 ĝis la 16a

Ĉeestas: Ĵanseb kaj Annie Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Joël Lajus, Olivier Moreno, Seán Ó Riain, Klodin' Pomirol, Marcelo Redoulez, Bernardo kaj Rose-Sarlandie, Jean-François Seylier.

Senkulpigitaj: Lucienne Laroche, Eric Tiffon

Elvezio salutas al ĉiuj.

1. Lingvofesto

Elvezio: Seán, .Luca, Ĵan-Seb deĵoris je la Lingvofesto dum la tuta tago

Seán: Ni disdonis multajn kalendaretojn kaj flugfoliojn. Multaj vizitantoj miris, ke daŭre ekzistas tia lingvo.

Elvezio: Ni povis montri afiŝojn, kartludojn, ktp.

Luca: Mezkontentiga konsekvenco: ne multaj venis poste al la kurso.

Elvezio: Luca anstataŭis Elvezion por la kurso, ĉar Elvezio festis la 102an naskiĝ-tagon de la patrino.

Luca: En loka festo en Cenon tenis budon kun Dominiko kaj Geneviève. Homoj vizitis la budon sed ne estis konvinkitaj.

2. Eŭska renontiĝo

Marcelo: La aŭtuna renkontiĝo okazos komence de novembro apus Pamplono

3. Pri GEME

Yannick: La banko ricevis 700 kaj kelkajn € de la asocio.

4. Pri Brassens

Yannick: Bona novaĵo: S-ino Bertrand, responsulino pri la libro servo de la Brassens-muzeo, telefonis kaj petis mankantajn dokumentojn, urĝe sendotajn. Ili estis senditaj. La muzeo mendos 15 ekzemplerojn, per kiuj, ni ne gajnos kaj ne perdos: estis elspezitaj por tiu eldono 994 €, t.e: po 12,40€ por ĉiu ekzemplero. Kun la 30%-rabato, ni vendas ĉiun ekzempleron je 12,70€

Notinde, ke la adreso, sur la INSEE-dokumento, daŭre estas en Palmer.

Marcelo: Sendis la tekston de la prelego al la muzeo. Neniu respondo ĝis nun. Espereble, ĝi estos en la programo de 2026.

5. Aliaj aferoj

Yannick: Baldaŭ mendos la kalendaretojn.

Elvezio mencias mesaĝon de Seán, kiu transsendis tiun de la prezidanto de UEA (post la ricevo de LEGI), rilate al la membroj de Esperanto-Gironde, kiuj ne aliĝis al UEA.

Bernardo kaj Rose renkontis dekduon da geesperantistojn dum semajno en Montalivet, kadre de INOE (Internacia Naturista Organizo Esperanta). (Vd artikolon p.14.)

Konversacio pri Esperanto kaj kongresoj

Seán: Ĉefe Eŭropo bezonus Esperanton, pro la granda nombro de lingvoj.

Joël: En 2025 la UK okazis en Brno, kaj en 2026, ĝi okazos en Graz, do du sinsekvaj en Eŭropo.

Seán: Efektive, tio estas malofta okazaĵo. Tiu de 2027 okazos ĉu en Aŭstralio, ĉu en Brazilo.

De kiam UNESKO agnoskis Esperanton, kiel lingvon kaj kulturon, pli kaj pli da landoj ĝin agnoskas. UNESKO proponis deklari la 6an de julio Tago de Esperanto sed pluraj landoj kontraŭstaris.

Luca bedaŭras, ke la Virtuala Kongreso ne estas senpaga.

Joël ricevis la revuon de Esperanto Périgord. Plejparto de la artikoloj estas en la franca, por konigi Esperanton al ne-Esperantistoj.

Klodin': LEGI povas aperigi artikolojn en la franca.

Bernardo renkontis en Montalivet dekduon da membroj de INOE (Internancia Naturista Organizo Esperantista).

Marcelo: Pri Esperanto +: ili sekvas plurajn Esperantistajn familiojn en Kongolando kaj helpas per sendo de mono, por ke ili havu la fortojn por disvastigi Esperanton.

Marcelo: Juna Esperantistino el Tuluzo petis gastigon de Marcelo.

Joël retrovis dokumentojn el Esperanto France, uzeblaj ĉe budo por propaganda.

Marcelo: La traduk-laboro pri *Jacquou le Croquant* estas finita. Ĝi nun estas kontrollegata de Istvan Ertl.

Cetere Christain Leduc estas finpretiganta KDon. Ĝi aperos la 8an de novembro.

Elvezio: La venonta kunveno okazos la 23an de novembro.

La Zamenhof-tago: 14an de decembro.

Marcelo: Oni povus retrakti temon pri Zamenhof aŭ pri la historio de Esperanto-Gironde. Oni povus ankaŭ diskuti pri la Interna Ideo.

Elvezio: Jean-François povus prezenti la vivon de Zamenhof, tra la libro La Zamenhof Strato.
Elvezio legas la poemon de Schwartz **Esperantisto Ekesto kaj Malapero:**

Esperantisto, Ekesto kaj Malapero
Raymond Schwartz

Gazetartikolo
Aŭ varba parolo.
Favora impreso,
Ekintereso.
Lernolibro,
Sankta vibro,
Propaganda miasmo:
Entuziasmo!
Samideano,
(Je via sano!)
Kamarado,
Varbado,
Instruo,
En butontruo
Verda flago,
Glora tago!
Plua ŝtupo,
Nova grupo,
Nova sento,
Facila vento
Kaj poemo
Pri sama temo!

Post hezito
Delegito.
Laŭ bezono
Gazetabono,
Kotizoj
Kaj valizoj
Por kongreso.
Miraklimpreso!
Fraka vesto,
Bala festo,
Naci-kostumo,
Amindumo.
Hispanino,
Korinklino
Kaj esperoj.
Amleteroj.
Mielo,
Ĉielo!
. . . . . .
. . . . . .
Edzino:
FINO!

La kunveno finiĝas je la 12a 30.

Posttagmeze Seán prezentas MLA: MultLingva Akcelilo (Accélérateur de Multilinguisme).
Erasmus + financis tiun propedeŭtikan programon de novembro 2017 ĝis decembro 2019, en tri landoj (Bulgario, Slovenio, Kroatio) por 8-9 jaraĝaj infanoj.



La skipo de Zakozin Tiŝlar elektis la 500 plej oftajn vortojn kaj morfemojn en Esperanto, el la zagreba lerno-metodo de Stano Marĉek. Tio celis helpi infanojn lerni aliajn lingvojn.

Notinde, ke la kvin instruistinoj (ĉiuj pri fremda lingvo: angla aŭ germana) unue ne konis Esperanton sed sekvis unusemajnan trejnadon por kapabli instrui la bazajn principojn de la lingvo. Ili akordiĝis pri 250 morfemoj instruotaj al la infanoj.

La celo estis krei materialon kaj pedagogiajn resursojn por tute nova lerneja afero, antaŭ la lernado de fremdaj lingvoj. La infanoj ricevis 64 horojn da lernado. Komence estis planitaj 20 horoj da lernado, sed pro la entuziasmo de la lernantoj, oni fine atingis 654 horojn.
Estis organizitaj reciprokaj vizitoj, dum kiuj la infanoj interrilatis nur en Esperanto.

La lernado konsistis el, krom la gramatikaj kaj leksikaj temoj, kanzonoj, dialogoj, skeĉoj, specife kreitaj por la metodo. Aldoniĝis ekzercoj el Interreto el Esperanto12.net), al- kaj de-tradukoj, kaj ludoj: ekzemple, krei frazojn el hazarde elektitaj vortoj.

Fine de la lernado estis ekzameno kun parola kaj skriba partoj, kaj ankaŭ parola kompreno.
Oni povis konstati, ke plej multe da infanoj bone sukcesis en la ekzameno. Plie la disleksiaj infanoj pli bone legis Esperanton ol sian propran lingvon.

MLA estas disponebla ĉe *Lernu!*.

Raportis Janine

Demandoj al estraranoj: Seán Ó Riain, Unua Vicprezidanto de UEA

Intervjuita de Humphrey Tonkin

Humphrey Tonkin: *En la pasinta numero de la revuo, mi parolis kun la Prezidanto de UEA, Fernando Maia. Nun venas via vico, kara Seán. Kion vi povas diri pri vi mem? Pri via profesio, viaj studoj, viaj apartaj interesoj?*

Seán Ó Riain: Mi estas irlanda diplomato dum pli ol 40 jaroj, kaj reprezentis mian landon en ses landoj (Aŭstrio, Aŭstralio, Pollando, Germanio, Belgio, Argentino) kaj en pluraj internaciaj organizajoj (Konsilio de Eŭropo, EU, UN, IAEA/*Internacia Atomenergia Agentejo*).

Mia doktorajo, de Trinity College Dublin, traktis lingvoplanadon en Irlando kaj Kebekio. Mi ankaŭ studis juron. Unu el miaj dumvivaj pasioj estas plurlingveco kaj lingvopolitiko: mi parolas ok lingvojn flue (irlanda, Esperanto, angla, franca, germana, pola, hispana, kimra), kaj povas legi plurajn pliajn. Mi profunde interesiĝas pri la fortigo de la irlanda linvgo, kaj la lecionoj, kiujn povus doni al ni la sukcesa reviviĝo de la hebrea lingvo en Israelo, unika atingo.

Mi multe ĝuis mian diplomatian laboron. La irlanda vorto por diplomato estas **taidhleoir**, kiu devenas de verbo en la malnova irlanda lingvo de la 8-a jarcento, **do-adall**, kiu signifas *tuŝi*. Do, diplomatoj laboras tie, kie malsamaj landoj kaj kulturoj tuŝas unu la alian.

Por mencii nur unu aspekton de mia laboro, kie mi kredas, ke Irlando faris gravan kontribuon: de 2016 ĝis 2021 ĉe la reprezentejo de Irlando ĉe IAEA en Vieno, ni antaŭenigis novan traktaton por malpermesi ĉiujn nukleajn armilojn. *La Traktato pri Malpermeso de Nukleaj Armiloj* malfermiĝis por subskribo ĉe UN en septembro 2017 kaj ekvalidis la 22-an de januaro 2021. Ĝis nun ratifis ĝin 73 landoj kaj subskribis ĝin 94 landoj. Pri ĉi tiu traktato, mi proksime laboris kun multaj diplomatoj, precipe el Meksiko, Brazilo, Niĝerio, Sud-Afriko, Indonezio, Koreio kaj Nov-Zelando, kaj mi havis multajn kontaktojn kun ĉinaj diplomatoj.

Mi interesiĝas ankaŭ pri historio, geopolitiko, psikologio, homaj rilatoj (aparte la rilatoj inter viroj kaj virinoj). Kaj mi eĉ finis kurson pri aromoterapio kaj terapia masaĝo.

Mi kreskis en Tipperary (Tiobraid Árann), en la irlanda kamparo, kaj mi kvar-jara lernis melki bovinojn (mane, ĉar ni ne havis maŝinon!) ĉe la laktobieno de miaj gepatroj. Kiam mi estis naŭjara, dum malsano de mia patro, mia patrino, mia kuzino kaj mi melkis po naŭ bovinojn ĉiumatene kaj ĉiuvespere.

H.T.: *Ĉu vi havas familion?*

S. Ó R.: Mia edzino, Nathalie, estas franca ĵurnalisto, kaj mi havas du plenkreskajn filinojn, Aisling kaj Ciara, kiuj laboras en Svislando. Ankaŭ mia franca bofilo kaj lia rusa edzino laboras tie, kaj mi havas francan bopatrinon. Mia frato estas tradukisto ĉe la Eŭropa Parlamento en Luksemburgio kaj mia fratino estas kuracisto en Irlando.

H.T.: *Kiam vi eklernis Esperanton, kaj kiujn rolojn vi ludis aŭ ludas en la Esperanto-movado depost tiam?*

S. Ó R.: Mi eklernis Esperanton dum restado ĉe la irlanda ambasado en Aŭstralio: ambasadoro Ralph Harry pruntis al mi lernolibron, kaj invitis min al mia unua Esperanto-kongreso, en Sidnejo en 1991. Mi ĉeestis mian unuan UK en Vieno en 1992. Mi estas prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU). Inter niaj sukcesoj estas, ke la propono de EEU, «ke Eŭropo bezonas pli bonan lingvolernadon», al la Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo en 2021-22 estis la plej populara en la eduka kaj kultura kampo, el pli ol 17 000 proponoj. Dum la pasintaj kvar jaroj, kiel direktoro pri plurlingveco en la irlanda Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, mi produktis plurajn ĉiumonatajn informilojn pri Esperanto, kiuj dissendiĝis al ĉiuj irlandaj diplomatoj tra la mondo. Inter ili estis informiloj por montri al gekole-

goj kiel Esperanto povas helpi ilin lerni la francan, hispanan kaj germanan lingvojn pli efike. Mi tradukis en la irlandan *Esperanto per la Rekta Metodo* de Stano Marček, kaj la *Zagreban Metodon*. Kaj en Esperanton la *Eŭropa Ĉarto por Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj* de la Konsilio de Eŭropo. Krome, por *Beletra Almanako 46* mi tradukis en Esperanton iom da poezio de la plej elstara irlandlingva poeto, Seán Ó Ríordáin. Mi alte taksas la revuon *Beletra Almanako*, kaj kolektis ĉiujn ĝisnunajn 51 numerojn.

En 2023 la brita eldonejo Routledge publikigis anglalingvan libron pri miaj lingvopolitikaj agadoj *Lingvopolitiko kaj la Estonteco de Eŭropo*. Ĝin kunaŭtoris kun mi Profesorino Alice Leal, brazila lingvisto ĉe la Universitato de Johanesburgo. Ĝi enhavas grandegan kvanton da informoj pri Esperanto. Germana traduko aperos ĉe Frank & Timme, Berlino, dum 2025; kaj franca kaj ĉina tradukoj prepariĝas.

H.T.: *Kiel vi esperas kontribui al la laboro de la Estraro kaj al UEA ĝenerale? Kiujn specialajn lertojn aŭ sciojn vi povos alporti al la laboro?*

S. Ó R.: Mi ŝatus uzi mian diplomatian sperton de pli ol 40 jaroj por kontribui al la fortigo de Esperanto, precipe en eksteraj rilatoj. Aldone al eksteraj rilatoj, la Estraro asignis al mi respondecon pri informado, pri la Revuo *Esperanto*, kaj pri Amikoj de Esperanto. Mi havas apartan respondecon ankaŭ pri agado en Eŭropo.

H.T.: *Kiel irlandano, kial Esperanto gravas al vi?*

S. Ó R.: Esperanto baziĝas je lingva justeco. Ĝi certigas egalecon inter parolantoj de la grandegaj internaciaj lingvoj kaj la miloj da pli malgrandaj lingvoj. Irlando suferis pro maljusteco, aparte lingva maljusteco, dum pli ol 750 jaroj da eksterlanda okupado. La unuaj leĝoj kontraŭ la irlanda lingvo, la *Statutoj de Kilkenny*, akceptiĝis jam en la jaro 1366. Tamen, la irlanda estas inter la plej malnovaj literaturaj lingvoj en Eŭropo: ĝia unua literatura teksto, la *Amra Choluim Cille* (Lamento por Sankta Kolm Kille), datiĝas de la jaro 597. Ĝi restis la plimulta lingvo en Irlando ĝis la Granda Malsatego de la jaroj 1845-49, kiam preskaŭ du milionoj da homoj mortis pro malsato. Ankoraŭ en 1882, Maolra Seoighe estis pendumita pro nekompreno de la angla: li estis senkulpa akuzito pri murdo, kiu defendis sin en la sola lingvo, kiun li scipovis – la irlanda. La tribunalo ne komprenis lin, ĉar angla leĝo de 1737 malpermesis uzon de la irlanda lingvo en tribunaloj. Li estis pendumita en Galway la 15-an de decembro 1882, la tagon kiam Zamenhof naskiĝis en 1859. Li postlasis edzinon kaj kvin junajn infanojn.

Malgraŭ ĉi tiu malĝojiga historio, mi konsideras la anglan lingvon kiel ruĝan rozon, tre belan kaj popularan floron – sed kiu el ni ŝatus havi ĝardenon plenan de ruĝaj rozoj sed neniu alia floro? Tien, bedaŭrinde, kondukas la superregado de la angla. Mi sentas, ke ni devas kontraŭstari, ne la anglan, sed la superregadon de iu ajn etna lingvo, kaj la neeviteblan maljustecon, kion tio kaŭzas. Tion ni faru per la samrajtiga Esperanto.

Krome, mi vere amas uzi Esperanton, kaj ege ĝuas la Esperantan literaturon, precipe Kalocsay, Auld, Camacho kaj multajn aliajn.

H.T.: *Aldone al Esperanto, kiuj estas viaj plej amataj ŝatokupoj?*

S. Ó R.: Legado, promenado kaj kantado. En Vieno dum kvar jaroj mi lernis kantadon. Mi ŝatas kanti, sed, aldone, mi vidas politikan gravecon en kantado. Irlanda patrioto de la 19-a jarcento Thomas Davis, iam diris, ke al li ne gravas, kiu verkos la leĝojn kondiĉe ke estos li, kiu verkos la kantojn! Kaj li verkis multajn kantojn, kiuj ege plifortigis la deziron por irlanda sendependeco. Simile gravas ke ni uzu kantadon pli efike por antaŭenigi Esperanton kaj lingvan justecon. La Eŭropa Himno havas oficialan melodion, la Naŭan Simfonion de Beethoven, sed ne havas oficialajn vortojn. Ni do kantu la Esperanto-version de Umberto Broccatelli!

H.T.: *Kaj viaj planoj kiel estrarano?*

S. Ó R.: Ege gravas instigi la landajn asociojn, kaj helpi ilin praktike, peti oficialan agnoskon de Esperanto kiel parton de la nemateria kultura heredaĵo de la koncerna lando. Mi povis iom helpi al la samideanoj en Pollando (2014) kaj Kroatio (2019) sukcese fari tion, kaj pro tio la sinteno al Esperanto fare de la Eŭropa Komisiono jam ŝanĝiĝis pozitive: la Komisiono nun pretas konsideri Esperanton por EU-projektoj, samnivele kun aliaj lingvoj, kiel ekzemple la kataluna, la eŭska, la bretona ktp. Ege gravas, ke aliaj landoj tutmonde donu tian oficialan agnoskon al Esperanto, por substreki, ke ĝi estas lingvo de kulturo.

Same gravas instigi la landajn asociojn kaj lokajn grupojn proponi al lokaj lernejoj la MLA (*Multlingva Akcelilo*, EUROPO), programon por uzi mallongajn kursojn de Esperanto por plirapidigi la lernadon de aliaj lingvoj. Tiel ni kontribuu al la plifortigo de plurlingveco, kiun Esperanto forte favoras. Tiel ni povas efike kontraŭbatali la du ĉefajn antaŭjuĝojn, kiuj malrapidigis la disvastiĝon de Esperanto dum pli ol jarcento – ke ĝi "ne havas kulturon", kaj ke ĝi celas anstataŭigi aliajn lingvojn.

Eltiraĵo el la novembra revuo de UEA, Esperanto, en kiu aperas portreto de la nova unua vic-prezidanto de UEA, Seán Ó Riain (ankaŭ vic-prezidanto de Espéranto-Gironde!). Rimarku, ke la foto de la antaŭa paĝo estis farita en Pessac (vd LEGI 178, p.19).

ESPERANTO-GIRONDE
KUNVENO en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC
la 23an de novembro 2025
de la 10a 30 ĝis la 16a

Ĉeestas: Annie kaj Jean-Seb Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Yannick Dumoulin, Hervé Giranton, Katya Gradzion, Seán Ó Riain, Klodin'Pomirol, Marcelo Redoulez, Bernardo kaj Rose Sarlandie, Jean-François Seylier, Eric Tiffon

Elvezio: Bona novaĵo: Du novaj gestudentoj en la Universitato, kiuj ambaŭ eklernis per *Lernu!*
Ili interesiĝas pri la Grajneto (sed ŝajne ne iris lastan fojon). Ili nomiĝas Isaac Marchand kaj Jaya Paschale.

Eŭska renkontiĝo: raporteto estis verkita (vd.p.16)

Brassens-libro: La mendo de la Espace GB alveni por 15 ekzempleroj. Mardon **Yannick** sendis ilin. Ili devus alveni ĵaudon sed ne alvenis. Sur la paĝo de Colissimo: «problemo okazis. La liverado okazos nur vendredon...» Vendredon matene: mesaĝo «alvenos hodiaŭ via pakaĵo» sed nenio okazis. Ankaŭ sabaton mesaĝo: «problemo (re)okazis. Ni liveros ĝin plejeble baldaŭ ».
Yannick telefonis al ili, diskutis kun robotino kaj parolis kun reala ulo: la centro estis fermata sabatmatene. Yannick petis ke ili liveru ĝin mardon.

Alia problemo: La muzeo dependas de la urbo Sète: la fakturon oni devas fari per ChorusPro (oficiala financa retejo).
Yannick telefonis al la metropolo por helppeti. Post pluraj provoj, li sukcesis krei fakturon.
Nun restas proks. 35 ekzempleroj. Ankoraŭ ne reklamis en Fejsbuko.

Yannick «preskaŭ» mendis la kalendaretojn.

Hervé proponas: En Parizo li povos preni ilin kaj porti por la Zamenhof-festo.

Elvezio ricevis informon de UEA: Nova universitata kurso inter pluraj landoj: Esperanto kiel interfaka kampo por novigado. Universitatanoj el Tours. Prof. Philippe Planchon (lingvisto) (por pliaj informoj, alklaku la ligilon pri tiu programo: https://www.tejo.org/fr/lernu-pri-esperanto-ricevu-6-ects/)

Marcelo: Finiĝis tradukrondo pri l' bildstrio. Dum pasinta monato mankis al la tradukantoj la tempo. La afero estas nun inter aliaj manoj.
- Pasporta Servo: Lastan dimanĉon, Marcelo kaj Klodin' akompanis junulinon el Tuluzo, kiu venis por kuri la maratonon! Ŝi studas filozofion sed ĉefe sportumas. Ŝi ĵus antaŭe kuris la tuluzan maratonon kaj alvenis 3a inter la inoj. En Bordozo ŝi alvenis post 1:27' kvankam ŝi celis 1:17'. Estis 14.000 kurintoj! Do la PS tre utilas! Venontan merkredon alvenos en Bordozo Dennis, kiu jam venis pasintan jarcenton (antaŭ 40 jaroj). Li faris la BEK, Bazan Ekzercaron.
Li alvenos je la 18:30 al la stacidomo, ni povus kafumi kun li ĉirkaŭ ĝi. Li foriras frumatene vendredon. Li alvenas tro malfrue por ĉeesti la kurson. Eblas, ke ni vespermanĝos en Le bouillon.

Luca: Tri novaj artikoloj por LEGI

Katja: Ŝia familio venis al ŝi por resti unu semajnon. Panjo, bopatro, bofratino, nevino kaj frato! Ili havis bonan okazon paroli Esperanton... Sed venis surprize por la naskiĝtago de Katja!

Z-festo la 14-an de decembro. Temos pri « la interna ideo ».

Seán prelegis rete pri E-o al 30 irlandaj studentoj vendrede. Kontaktis lin irlanda ambasadorino. Seán prelegis pri utilo de E-o por pl ibone lerni aliajn lingvojn.

Marcelo finenpaĝigis la venontan *Sennacieca Revuo* de SAT.
- Artikolo pri vilaĝo en Japanio, kiu estis bombadita antaŭ Hirošima.
- Alia artikolo pri nuna mara rivaleco inter Koreio kaj Japanio.
- Kontribuo pri speciismo kaj kontraŭspeciismo.
- «Kio estas burĝŝtatiĝo?»
- Dosiero pri la Pariza Komuno

Ĝi devus ekaperi en decembro.

Dua projekto: muzikigo far Nanne (Kajto) de la tekstoj el la novelo *Sorĉe de verda stelo,* kiu iĝos teatraĵo.

Diversaj aferoj:
Nun okazas brazila kongreso.
UEA heredis du loĝejojn kaj vendas ilin.
Afrikanoj havos kongreson en Burundo kaj postulas monon por akcepti la partoprenantojn. Sed ekzemple la irananoj sukcesas ne bezoni monon, kiam eblas.
Resume: UEA ne volas financi ion ajn, ĉar lastan jaron malaperis 30 000€ dum la UK en Aruŝo...

Fino de la kunveno je la 12a.

Post la manĝo, Marcelo kaj Klodin' prezentis bildaron pri Bretonio, kaj interalie bildon de bela dometo en fiŝiista vilaĝo Doëlan (Finistère). Ili divenigis al ni, pro kio tiu dometo famiĝis. Ni malkovris, ke en tiu dometo, kiu apartenis al Benoîte Groult kaj Paul Guimard, Robert Badinter verkis sian paroladon kontraŭ mortopuno, kiun li prononcis antaŭ la Nacia Asembleo, por obteni la abolon de mortopuno la 18an de septembro 1981.
Sekve ili proponis kvizon pri mortopuno kaj ties abolo.

Raportis Luca kaj Yannick

Ĉu Eŭropa Unio vekiĝas ?

Okaze de la pasinta oktobra grupkunveno en Pesako, nia amiko Seán lerte prezentis al ni programon cele al instruado de lingvoj tra Eŭropo. (Vd p.7-8)
En tri landoj de EU oni starigis eksperimentojn kun pluraj grupoj da infanoj uzantaj aŭ ne Esperanton. La rezulto estis, ke la grupoj, kiuj unue lernis la bazajn elementojn de Esperanto, kapablis lerni iun fremdan lingvon pli facile kaj pli rapide ol la infanoj, samaĝaj, kiuj ne konis Esperanton.
Kompreneble ni, geesperantistoj, ĝojas ke Erasmus, kiel kultura fako de EU, oficiale konstatas la efikon de nia universala lingvo kiel helpilo por la instruado de lingvoj; eĉ se ni ne forgesis ke en la jaro 1980 Profesoro Franck, kadre de la Instituto pri Kiberniko en Paderborn (Germanio), jam montris pere de similaj eksperimentoj tiun propedeŭtikan rolon de Esperanto.
Verŝajne la raportoj de Profesoro Franck dormas en iu tirkesto kaj neniam atingis Bruselon kaj la fakulojn pri Edukado en la estraro de EU.
Tamen la sukceso de tiu programo far Erasmus estas por ni kuraĝiga novaĵo, kiu ebligas esperi, aŭ almenaŭ revi pri aliaj progresoj en la uzo de Esperanto en EU.

Joël

EURONAT

Ekde nia alveno en Ĝirondio en 1977, ni ĉiam banis nin nude ĉe la plaĝoj de la atlantika oceano. Ni malkovris Euronat dum talasoterapio je la komenco de tiu jarcento. La loko plaĉis al ni, do ni tendumis tie plurfoje dum la sekvontaj jaroj. Tiutempe, ĉe la akceptejo, laboris juna samideanino, Magali LAJUS, kun kiu ni teatrumis. Parolante Esperanton ni surprizis la aliajn knabinojn, ĉar ili neniam aŭdis tiun lingvon antaŭe. Kaj, ĉar ni loĝas nur unu horon kaj duono for de Euronat, ni decidis aĉeti dometon por ferii pli ofte en tiu granda spaco, la plej granda naturista loko en Eŭropo (330 hektaroj). Bedaŭrinde la lu-kosto plialtiĝas pli rapide ol nia pensiulaj enspezoj. Sed, ĉar ni ŝatas la lokon, ni provos konservi nian dometon la plej eble longa tempo. Krom dum la someraj ferioj, ni vizitos Euronat printempe por flari la bonan odoron de la mimozo. Somere ni kolektas rubusojn por prepari konfitaĵon. Ni regule renkontas tie anojn de INOE. Ni revenas aŭtune (tempo por arbozoj) por talasoterapia sesio, kaj iomete pli poste ni revenos denove por serĉi fungojn. Tiam estas la fino de la malfermo de nia dometo ĝis la sekvonta printempo. Tre ofte ni restas en Euronat kun Maeva, nia handikapata filino aŭ/kaj Jade, unu el niaj nepinoj. Ambaŭ tre ŝatas tiujn restadojn.

Bernardo k. Rose

Anekdoto

Okaze de la kunveno ĉe Ĵanseb la 31an de aŭgusto, dum ni preparis la budon por la forumo de la pesakaj asocioj, afiŝoj de la lasta Eŭropa baloto kuŝis sternitaj sur la tablo. Seán tiam laŭdis la agadojn de EDE kaj bedaŭris la fakton, ke nur en Francio E-listoj estis starigitaj okaze de tiuj balotoj. Li menciis, ke en Germanio, la esperantistoj, kiuj iam ankaŭ prezentis liston, nur unu fojon tion sukcesis, ĉar sekve ili inter si ne plu akordiĝis.

- Ankaŭ esperantistoj estas tiaj! ĉagrene devis konfesi Marcelo.
- Ho! ŝerceme respondis Seán. Prenu du irlandanojn, kaj vi jam ricevas tri diversajn opiniojn!

Anonco el ESPERANTO - Organo de UEA - n-ro 1407 / decembro 2025
rubriko **KULTURO**

Internacia literatura Esperanta konkurso

“Hristo Gorov-Hrima” – 2026

Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Liahonore Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povas partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj. La konkurso estos por eseo. La temo de la eseo estas:

“Mia plej bela Esperanto-rememoro”.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu eseo, originale verkita en Esperanto. La verko estu tajpita komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton kun supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefonnumero kaj interretadreso. La eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman 12punktaj.
La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.
Georgi Mihalkov

Bonvolu sendi viajn kontribuojn
ĝis la 30-a de septembro 2026 al Georgi Mihalkov, prezidanto de la ĵurio, retadreso: modest.mihalkov@gmail.com

****

Ĉu Esperanto-Gironde pretus komune verki "eseon" por amike partopreni en tiu konkurso?
Ni povus dediĉi ateliero(j)n dum niaj venont-jaraj monataj kunvenoj, ĉu ne?
Kiuj konstraŭas?
Kiuj sindetenas?
Dankon, unuanime aprobite!



Rafa Blanco

Eŭska Aŭtuna Renkontiĝo en Arbizu kaj omaĝo al pioniro

De pli ol dek jaroj eŭskaj esperantistoj aranĝas printempajn kaj aŭtunajn renkontiĝojn en diversaj lokoj de la lando, ambaŭflanke de Pireneoj.

Ĉifoje la 6an, 7an kaj 8an de novembro okazis, same kiel la pasintan jaron, en la kampadejo de Arbizu (Nafaro) la Eŭska Aŭtuna Renkontiĝo. Ĉeestis dekopo da partoprenantoj. Ĉi-aŭtune ni bedaŭrinde ne ĝuis la agrablan viziton de ĝirondanoj, kun kiuj de jardekoj ni havas kaj tenas bonegan rilaton.

En tipe aŭtuna vetero (pluvo, nebulo, suno, ne tro malvarma temperaturo) nin trafis programeroj, kies pinto estis la omaĝo al loka esperantistino, pedagogistino kaj profesorino Maria Ana Sanz Huarte, estrarano de la Esperanto-grupo de Pamplona-Irunjo komence de la 20a jarcento. Apud statuon starigitan al ŝi ni surmetis florbukedon, legis poemojn de ŝia kolegino kaj esperanta poeto Amalia Núñez Dubus. Tiuj poemoj *Al la nova jaro 1925* kaj *Novembra printempo* multe plaĉis al la ĉeestantoj. Por fini la omaĝon ni kunkantis la *Birdeca bird´*.

Ne mankis frandinda sabata bankedo, gufujo, promenadoj en apudaj vilaĝoj kaj vizito al la sanktejo de Aralar.

La etoso en la kampadejo malgraŭ la malvarmaj kaj pluvaj vendredo kaj sabato estis luma, ĉarma kaj bela. Venontjara printempa renkontiĝo okazos en Donapaleo / Saint Palais (Basnafaro). Vi estos bonvenaj.

Pri la poeto: Amalia Núñez Dubús

Pamplono-Irunjo (1889-1977)

Ŝi estis profesorino en la lernejo por instruistinoj de Pamplono-Irunjo, kie ŝi estis unue lernanto kaj poste kolego de Mariana Sanz Huarte, ankaŭ esperantista kaj grava pedagogistino en Nafaro tiutempe.
Amalia esperantistiĝis en 1911, kaj de tiam ekis riĉa kaj sindonema agado en la esperanta literaturo ĝis preskaŭ ŝia forpaso. Ŝi bonege kaptis la nuancojn de la lingvo kaj atingis bonegan nivelon en sia beletra produktado, nome, originala poezio, traduko kaj recenzoj.
La kvalito de ŝia poezio tiel elstaris, ke Kalmán Kalocsay elektis kelkajn poemojn de Núñez Dubús por la kolekto *Dekdu poetoj* publikigita en 1934.
Ŝia voĉo mallaŭtiĝis dum kaj post la hispana intercivitana milito. Ŝi estis reprezaliita en sia profesio, kaj Esperanto malpermesita dum kelkaj jaroj. Ekde la kvindekaj jaroj, tamen, nia verkistino verkis denove, ĉefe per recenzoj kaj tradukoj, kaj pliriĉigis sian esperantan literaturan agadon.
Jen du poemoj, kiujn ni recitis dum la Eŭska Aŭtuna Renkontiĝo, ĉe la statuo omaĝe al Mariana Sanz Huarte en Irañeta, proksime al Arbizu.

Dum novembra aprilo

Aŭtuno volas festi,
printempe sin transvesti,
burĝonas nove flor',
eksaltas ree kor'
por nesti.
Kaj tamen venas vintro
(sed ĝi prokrastos sin tro).
Post pluvo dumonata
ĉiel' lazura, glata,
post cindro.

Ĉu estas pli alloga
vort' vera aŭ mensoga?
Ĉu portas pli da sveno
sanilo aŭ veneno droga?
Ni revu: temp' someras,
mi kredas kaj esperas;
nigrega okulparo
min gapas en l' arbaro.
-Am' veras.

Novjara Saluto (al 1925)

La paco sur la tero nur estas mito
ĉie la mondon premas grandaj doloroj,
ĉie resonas eĥoj de la milito: mortoj,
brulegoj, pafoj, vundoj kaj ploroj.
La homoj sian vivon pasas per kantoj
kaj forgesas la sangon de la vunditoj,
la kriojn gajecplenajn de la venkantoj
kaj la plorantajn kriojn de la venkitoj.
Nure super kruelaj homaj doloroj
brilas inter la nuboj la Verda Stelo,
ĝi volas unuigi korojn kun koroj
kaj la mondon klarigi per ĝia helo.
Inter homaj bataloj, estas perdita
tia voĉeto kiun oni forpelas,
ĉar al mondo freneza, fumo milita
nun plenkovras tion, kion ni celas.
Sed ĝia lumo estis ne senutila
inter miloj vokitaj, kelkajn ĝi trovis:
la Steleto lumigas per lumo brila
ĉar se multaj ĝin neis, kelkaj sin movis.
Jam post la nigra nokto, la lum' aperas,
permesu ke tra limoj, lingvoj kaj rasoj
frate sin amu tiuj, kiuj esperas,
ni, hodiaŭ, polvero, morgaŭ amasoj,
ke trovu feliĉecon tuta homaro
dum la venonta jaro, la dudekkvina,
saluton al tutmonda amgefrataro,
kaj al ĉiuj la landoj, paco senfina.

Unuarange: Bergère, Natxo, Niko, Deborah, Evelyne, JoPo, Marie
Duarange: Xavi, Dominiko, Rafa

Marcelo

Nia Brasenso en lia muzeo en Seto

Ĵaŭdon la 11an de septembro Klodin' kaj mi vizitis la muzeon *Espace Georges Brassens* en Seto, lia naskiĝurbo, kaj tie ni renkontis la dokumentistinon, S-rinon Rosalie Celma. Ŝi tre varme akceptis nian libron kaj tuj foliumis kaj taksis ĝian altvaloron. Tial ŝi konsentis tuj viziti la direktorinon. Bedaŭrinde ŝi lasta estis tro okupita kaj ne eblis interparoli kun ŝi. Sed alvenis S-rino Bertrand, respondeculino pri la butiko. Ĉi-lasta proponis, ke Esperanto-Gironde sendu antaŭfakturon por 15 ekzempleroj per la retejo de la muzeo. Ili tiam taksos, ĉu indas aŭ ne disvendi la libron en la butiko de la muzeo. Tiuj du virinoj jam konis Blaise Guinin, la ilustristo, pro lia antaŭa bildlibro « Georges et la mort ».
Rosalie Celma konfesis, ke ŝi frandas la « ekzotikajn » librojn, kia ŝi taksis la nian. Al ŝi mi proponis prelegon pri la temo Brassens en Esperanto okaze de evento kaj la ideo ne malplaĉis. Ankaŭ por tio ni devas perrete sendi proponon.
NI poste vizitis la muzeon. Nun per individua aŭdaparateto Brassens mem gvidas la viziton tra sia vivo. Multaj fotoj, originalaj verkoj, gitaroj, mebloj kaj pipoj... Kaj filmetoj kun kanzonoj. Kaj en la 'kinejo' la projekciado de la koncerto en Bobino 1975: nur tio ne ŝanĝiĝis kompare al nia antaŭa vizito en 2011.

Elirinte ni preterpasis la marteatron, kie en 1994 La Kompanoj triumfis dank' al brila prezento de sia "Vizito ĉe Oĉjo Georges". Kia bela memoraĵo!

Amuza skeĉo:

Vendis sian skribmaŝinon

nek fonto, nek aŭtoro konata

Du roluloj: Vir(in)o A kaj vir(in)o B
Sceno sur trotuaro.

A. Mi ne vidis vin de kelkaj tagoj jam, kvankam ni loĝas en najbaraj ĉambroj de sama pensiono.
B. Ne, miaj horoj iom ŝanĝiĝis en la laborejo.
A. Kiel progresas viaj pentrolecionoj per korespondado?
B. Sufiĉe bone, mi kredas.
A. Kion vi pentras nuntempe?
B. Ankoraŭ nenion. Mi lernas miksi la kolorojn.
A. Nur miksi la kolorojn, ĉu? Ĉu vi devas lerni tion?
B. Jes! Tre grava afero! Oni devas havi la ĝustan koloron.
A. Ĉiu scias, ke herbo estas verda kaj tomato ruĝa.
B. Ĉu scias vi, kio okazus, se oni miksus brunon kun nigro?
A. Ne. Eble eksplodo. Ĉu scias vi?
B. Ne, sed mi lernos. Kiel progresas via perkoresponda kurso pri novelverkado?
A. Ne tre bone. Mi estis stulta pensi pri verkado. La reklamo en la ĵurnalo diris: "Lernu verki novelojn facile kaj grandprofite." Ĝi ne menciis, ke estas necese lerni gramatikon kaj havi inspiron.
B. Ĉu inspiron? Mi povas pensi nur pri vir(in)oj!
A. Mi ankaŭ devis aĉeti skribmaŝinon.
B. Mi povas aŭdi ĝin tra la muro. Ĉu vi devas uzi ĝin tiel malfrue en la nokto?
A. Ĝi ne plu ĝenos vin. Mi ĉesigis la kurson!
B. Bone! Nun mi povos dormi.
A. Hodiaŭ mi vendis la skribmaŝinon. Kaj per la mono mi aĉetis trombonon!

Memorinda teksto okaze de la 1a de majo

10 octobre 1906 : Congrès de la CGT.
17e Congrès National Corporatif.
IXe congrès C.G.T. Amiens du 8 au 16 octobre 1906.

Séance du 10 octobre (soir)

..."Il nous suffira d'en appeler à la mémoire de tous les congressistes qui ont assisté à des Congrès Internationaux pour montrer l'extrême difficulté qu'entraînent les sept ou huit langues qu'on y est, à l'heure présente obligé de parler et l'énorme économie de temps qui résulterait de l'emploi d'une seule langue dans ces Congrès où la traduction plus ou moins fidèle absorbe le plus clair du temps des congressistes.

Nous croyons donc que le Congrès Fédéral ferait besogne des plus utiles en s'associant aux vœux émis en faveur de l'Espéranto, dans les congrès corporatifs des peintres, des employés, des chapeliers, des céramistes, etc... et de plus, en votant l'ordre du jour suivant que nous avons l'honneur de lui proposer :"

" Le Congrès :
Considérant que l'émancipation intégrale des travailleurs ne peut s'opérer qu'internationalement mais que les différences de langage sont une entrave matérielle et presque insurmontable à l'entente des prolétaires de tous les pays :
Constatant l'extrême facilité d'apprentissage de la langue Espéranto et les éminents services qu'elle est appelée à rendre à la classe ouvrière organisée nationalement et internationalement :
Par ces motifs :
Le 17e Congrès Fédéral invite les secrétaires de Fédérations Nationales, de Bourses de Travail, de syndicats ouvriers et les militants desdites organisations, à faire la plus active propagande pour l'étude, la pratique et l'extension de la langue internationale Espéranto et à créer, partout où ce sera possible, des cours du soir pour tous les travailleurs."

Pour la Fédération Nationale des syndicats de peinture et parties assimilées.
Le délégué: Léon ROBERT
A Bousquet, Sellier, (employés). Marie, Janvion, P Hervier (Bourges). Bornet (bûcherons). Ch Dooghe (Reims). Gouly (Toulouse). Yvetot, Etg David (peinture). Tabard, Robert et Ferrier (Grenoble), Peyron, ? Montagne, (Inscrits maritimes du Havre). Antourville (alimentation).

Le rapport et l'ordre du jour en faveur de l'Espéranto sont adoptés à l'UNANIMITE.

MR

ÉDUCATION ENVIRONNEMENT 33

Drozero, karnovora planto en Ĝirondio!

Kun Klodin' kaj Katja la 5an de aŭgusto ni pasigis la posttagmezon en la pinarbaro ĉe Le Porge. Tiam la federacio de associoj pri fiŝkaptado kaj protektado de la akvaj medioj en Ĝirondio[1] organizis esploradon tra naturo ĉirkaŭ la lageto Langouarde. Simpatia, kompetenta junulino gvidis sepopan grupeton ĝis la celo de la promeno, komentante diversajn aspektojn de la pinaro. Post direktoŝanĝo, ni uzis vojeton suden kaj tiam ŝi atentigis nin pri la granda diferenco de la grundo inter la dekstra flanko pinarbara, seka ĉar la pinradikoj suĉas la profundon, kaj la maldekstra flanko, sen pinoj, marĉeca: ĝuste tia, kia erikejo troviĝis antaŭ la plantado de Bremontier fine de la 18a jarcento. Atinginte la lageton Langouarde la animantino prezentis per bildoj diversajn fiŝojn, kiuj naĝas en riveroj tra nia departemento. Sekve ŝi proponis paŝi sur pado tra la marĉeca zono ĝis la kanalo, kiu ligas la lagon Lacanau kaj la arkaŝonan golfeton. Kaj ĝuste tie, sur tiu pado, subite ŝi haltis, surgenuiĝis kaj klarigis per montrofingro:
- Jen drozero! Karnovora planto en Ĝirondio!
Vi ja povas imagi mian reagon! Mi de tiel longe sopiris tiun planton, kiu grave mankis al mia kolekto de sovaĝaj floroj. Multon mi legis pri ĝi en diversaj libroj. Fotojn mi vidis rete aŭ sur panelo borde de padoj. Tamen neniam mi sukcesis propraokule vidi unu specimenon. Kiel infano antaŭ nova ludilo, mi sentis entuziasmon, kaj ankaŭ surgenuiĝis, fotadis. Jam saman fervoron mi sentis iam por alia sovaĝa floro: edelvejsoj sur Alpa monto super Tignes (Savojo).
Nu fotoj iel povas trompi la imagon. Kaj la imago povas erarigi nin en la realo. Neniu danĝero por vi ĉe tiu planto. Vi ne riskos algluiĝi kaj resti kaptito de la folioj, kies enzimoj digestus vin kiel insekton... tiu planto mezuras nur kelkajn centimetrojn, kaj se spertulo ne montras ĝin al vi, vi simple paŝos sen rimarki tiun mirindan planton, kaŝitan sub herboj!
Domaĝe!

---

[1] Fédération des Associations Agréées de Pêche et de Protection du Milieu Aquatique de la Gironde

Drosera rotundifolia
Rossolis à feuilles rondes
drozeracoj

5-20cm
jul-aŭg - plurjara

Drozero rondfolia aŭ Sunroso

Al la multnombraj gutetoj brilantaj sur ĝiaj folioj la planto ŝuldas sian kromnomon « sunroso » el la latina *ros solis*. Reale temas pri viskeca substanco entenanta enzimojn. Kiam insekto tuŝas folion, ĝi algluiĝas kaj ĝiaj movoj tiam stimulas la glandoharojn, kiuj post unu aŭ du minutoj kurbiĝas enfermante la predon. La enzimoj tiam digestas la beston, tiel alportante la azoton necesan por nutri la planton.

Drosera rotundifolia
Rossolis à feuilles rondes
drozeracoj

5-20cm
jul-aŭg - plurjara

Drozero rondfolia aŭ Sunroso

Drozero estas foteblaj norde de Bordozo proksime al lagetoj, kie ĝi atestas pri malsekaj, marĉecaj grundoj. Eblas akiri ĝin en komercoj, sed tiam plej ofte importita el Afriko aŭ Azio.

Spite al ĝia ruĝa ĝenerala aspekto drozero estas floro kun kvin blankaj petaloj.

Fotitaj de Janine Dumoulin

ĉi-sube digestanta folio

Klodin' aldonas:
Malgrandeco de la planto klare videblas kompare ne al fingro sed nur ungo de la animantino.

Janine aldonas:
Drozeroj kreskas ankaŭ apud la lageto de Montendre (17)! Vidu la fotojn!

Noveleto de Marcelo

La malnova partituro

Tiu blonda sesjara knabineto multe parolas, senĉese zumadas melodiojn kaj kreas proprajn kanzonojn laŭ fluo de sia senbremsa imagpovo. Ŝi ŝatas diskuti kun la maljuna najbaro. Reciproke ankaŭ li ŝatas interŝanĝi kun ŝi. Lin en la vilaĝo oni nomas "la ĉina maristo", kvankam ĉiam ridete li ripetas, ke li estas koreo. Li foje rakontis al la knabino pri fabelaj vojaĝoj trans ĉiuj oceanoj kaj malkovro de mirindaj trezoroj. Tamen pli ol ĉio, li preferas subaŭskulti ŝin, kiam ŝi fantazias kun sia ĉifona pupo.

Iam en la ĝardeno konsolante la pupon, ŝi eligis melodion kian neniam antaŭe. Komence flustre sed poste tute klare kaj flue distingiĝis la tonoj. Kaj ĝuste tiu kanto mirigis kaj kortuŝis la maljunan mariston. Kiel eblas? De kie fontas ŝia inspiro? Kiam ŝi silentis, li milde alparolis ŝin:
- Karulineto, bonvolu rekanti tiun lastan melodion.
Kaj volonte la etulino senŝanĝe ripetis, eĉ dufoje!
Viŝinte larmon de sur sia vango, la oldulo dankegis. Tiam li supreniris al la subtegmentejo kaj post mallonga serĉado li prenis el malnova kofro polvokovritan lignan kesteton.

Antaŭ ol doni ĝin al la knabineto li forte blovis sur ĝin sed tio ne sufiĉis por tute senpolvigi ĝin. Nur post pli zorga viŝado aperis sur la supro neordinaraj skribaĵoj, por ŝi nekompreneblaj signoj. Al ŝia demandoj pri ilia signifo la maljunulo enigme respondis, tial ŝi mem kreis respondon. Ŝi asertis, ke estas skribite "princina trezoro". Ŝi lerte manovris la feran klinketon, delikate malfermis la kesteton kaj interne trovis zorge volvitan, nekutiman paperon. Ĝin ĉirkaŭis ruĝa rubando. Ŝi ne urĝis malnodi la ligilon. Male ŝi tre atente agis, ĉar la maristo bone klarigis, ke temas pri valora pergameno, tie for nomata *hanji*, mola sed forta papero farita el interna ŝelo de morusarbo.

- Tre belaj estas tiuj desegnetoj bele ordigitaj en siaj ĉeloj. Ĉu ili rakontas ravan historion? Ni povus kune inventi ĝin.
- Karulineto, jen por vi donaco de tre malnova, tradicia popolkanto el mia fora lando. La signoj, kiujn vi nomas desegnetoj, estas skribaĵoj, kiuj indikas muziknotojn. Temas do pri malnova korea partituro. Sed plej mirinde, vi mem antaŭ momento kvazaŭ perfekte kantis ĝin trifoje antaŭ mi.

** * **

Tempo, jaroj, eĉ du jardekoj pasadis. Antaŭlonge forpasis la maljuna koreo, kiam hazarde en sia kelo, la virtuoza pianistino retrovis la lignan kesteton. Forblovinte la polvon, ŝi revidis la nekompreneblajn signojn, kaj tuj memoris pri la "princina trezoro" kaj ĝia enhavo. Zorge volvita kaj ligita per la ruĝa rubando, la pergamena partituro gardis sian rave sorĉan melodion. Ĉar ŝi ne plu klare sed nur konfuze memoris pri la melodio, kiu antaŭ jaroj ŝprucis el sia menso, ŝi decidis transskribigi la notojn. Ĉu vere tion ŝi kantis aŭ ĉu la maljuna koreo aŭdis sian koron?

Kelkajn semajnojn poste okaze de neordinara solena festo favore al senhejmuloj ŝi raportis al la publiko la historion de la malnova partituro, antaŭ ol ludi la tradician korean popolkanton laŭ partituro adaptita por piano. Varmaj aplaŭdoj kronis la prezenton!

De tonoj al notoj

Flustru al nia kapo
tonojn el frua tempo
kaj malfermiĝos klapo,
ŝprucos kant' por printempo.

Neniu scias, de kie inspiro
ĉerpadas eltrovojn por malvelko.
Mirindas foje la longa aliro
de l' fonto abisma ĝis la verko.

Ĉu ni la ritmon kaptis
aŭ ĉu pli veras malo?
Gravas ke ni adaptis
takton por recitalo.

Muziko sonas unue enmense,
ĝi nutras senteman komponiston,
nur poste povas ni skribi plenpense
la notojn, por gvidi la soliston.

L'Hortie, fine de junio 2025

ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * * * *

Adreso ĉe la prezidanto

* * * * * * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne
UFR Langues,
Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac
Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Vic-Prezidanto: **Seán Ó RIAIN**
98 route du Mouquet
40160 Parentis-en-Born

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasisto: **Yannick DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 06 84 11 26 95 / yannickdum@aol.com

* * * * * * *

Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr

La venonta kunveno okazos en la Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC, je la 10a30 la 14an de decembro.